



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

mi esperas, ke vi travivis kristnaskon bonhumore kun viaj parencoj kaj amikoj. Mi bondeziras vin, ke la nova jaro estu pli bona ol la antaŭa kaj ke ni estus sanaj. Mi esperas, ke ĉi jare nian programon partoprenos pli da homoj kaj ke pli da esperantistoj riĉigos nian programon. Ne hezitu kaj venu. Parto de nia programo estos en klubejo, parto rete (se nova registaro ne timos kronviruson kaj ne malpermesos al homoj renkontadi). Ne timu kaj proponu por ni programon. Ju pli da homoj preparos nian programon, des pli bunta ĝi estos. Tute ne gravas, ĉu vi estas klubano aŭ ne.

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Postkristnaskaj impresoj

Gvidos: Milan Kolka

Amika babilado kaj rakontado pri kristnasko kaj nova jaro.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 4-an de januaro 2022 je la 18-a h.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo).

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

Renkontiĝo ne estos registrata.



Ni rekomendas

- Vizitu [Arbaristan Panteonon](#), belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Cetera programo en januaro 2022

La 11-an **Kiel oni verkas Starton** – Miroslav Malovec, Občanský klub, Hybešova 65a

La 18-an **Kodaj nomoj**, rete

La 25-an **Dormo de racio en soveta biologio** – Oldřich Arnošt Fischer, Hybešova 65a

Programo en februaro

La 1-an *Ankoraŭ nenio. Mi petas, ke vi proponu temon.* Rete

La 8-an *Ankoraŭ nenio. Mi petas, ke vi proponu temon.* Občanský klub, Hybešova 65a

La 15-an *Ankoraŭ nenio. Mi petas, ke vi proponu temon.* Rete

La 22-an **Membra kunveno / členská schůze** Hybešova 65a



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto